


ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2012/1

vintro/printempo 2012

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the
Lumo



LUMO

Lumon eldonas dufoje jare KEA, 2372 Haddington, Ottawa Ontario K1H 8J4.
Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association
Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

ENHAVO DE LA NUMERO

Kolumno de la Redaktoro	3
Anoncoj/artikoloj rilataj al KEA	
Ĉu fino de la Libroservo de KEA?	3
Speciala oferto por la membroj de KEA	4
Elekto de nova honora membro de KEA	4
Elekto de nova honora membro de KEA	4
Sinprezento de la novaj estraranoj de KEA	5
MEKARO 2012 (Kebeko)	8
Financaj raportoj de KEA por 2010	12
Aliaj anoncoj/artikoloj	
Anonco pri lastatempa libro (en la anglaj kaj en Esperanto)	15
Germana Reta Ekspozicio	15
Apero de libro de tradukoj en la anglan de esperantaj verkoj	16
Revoj de infanoj de Ĵenja Amis	16
Anstaŭoj por Keramikaj Krudmaterialoj de Edouard Bastarache	17
Eblas, ke dulingvismo malrapidigas la aperon de demenco en la maljuna aĝo – verkis Steĉjo Norvell	18
Fotoj de kelkaj Kalgariaj samideanoj	21
La Eduka Fondaĵo Carlson	22
Nekrologoj	
Lorne Guy Erickson	25
Myra Larsen	26
Brian Kaneen	27
Distraĵoj	
Kukolo en la Nesto	28

Limdato por la venonta numero: 1a de januaro 2013.

Kolumno de la Redaktoro

Mi ĵus mallonge rigardis miajn arkivojn kaj konstatis ke inter 2000 kaj 2004 mi redaktis ok numerojn de ĉi tiu revuo. Jam antaŭ tiom da tempo! Malmulto tamen ŝanĝiĝis en mia vivo inter 2004 kaj nun : mi daŭre estas profesoro pri antikvaj studoj (romia kaj helena historio) en la universitato otava. Nu, ja, mia persona vivo eble iom pli ŝanĝiĝemis dum tiuj jaroj, sed jam dum kelkaj jaroj nun restas stabila. Cetere menciindas ke kunlaboras kun mi pri la kompostado de ĉi tiu numero, kiel antaŭ ok jaroj, Steĉjo Norvell, kiu nun loĝas en Nov-Lando, ne plu en Halifakso. Mi kore dankas al li pro la daŭra helpemo kaj lerto pri kompostado; ni ambaŭ estas apogantoj de la programo *Wordperfect*, pere de kiu ni kunpreparas la revuon.

Mi kredas, ke ĉi tiu numero estos sufiĉe ampleksa. Mi konsideris enmeti raporton mian pri franca kongreso, kiun mi ĉeestis fine de majo apud Nantes, Francio, sed eble mi tion metos en la sekvan numeron. Iam poste ĉi-jare devos aperi kroma numero de *Lumo*, redaktita de Paul Hopkins, do ne mankos legindaĵoj por kanadaj samideanoj.

Kia estonteco por nia revuo? Leviĝis ja la demando, ĉar jam la kebekia gazeto, *La Riverego*, aperas nur rete en pdf-formato. En KEA, tamen, ni konscias ke almenaŭ iuj anoj ankoraŭ nek retemas nek retumas, do ni konservis ĉi tiun paperan version. Mi ne antaŭvidas subitan ŝanĝon, sed estas bone sciigi, ke oni pripensas la situacion. Alia gravega flanko de nia revuo estas vi, kara leganto: mi forte esperas kuraĝigi vin sendi al mi kontribuojn por la venonta numero, ĉu krucvortenigmojn, ĉu raportojn, ĉu fotojn, ĉu artikolojn pri ajna temo: mi ĝuste ĝojas aperi en ĉi tiu numero interesan artikolon de Steĉjo pri dulingvismo. Mi atendas viajn mesaĝojn.

Geoffrey Greatrex - greatrex@uottawa.ca

ANONCOJ/ARTIKOLETOJ

Ĉu fino de la Libroservo de KEA ?

de Normando Fleury

Mi respondecas pri la libroservo de KEA ekde 1984, sed fine de la jaro 2012 mi volas transdoni tiun respondecon. Ne pensu ke temas pri grandega laboro, ĉar homoj mendas malpli ol antaŭ dek jaroj. Tamen, vi devas havi bretaron de 5 bretoj ĉirkaŭ du metrojn longaj. Necesos ke vi iru al la poŝt-oficejo unu fojon ĉiumonate por sendi mendojn kaj ke vi pretigu finanĉan raporton fine de la jaro.

Se neniuj anoncoj sin, la servo malaperos kaj Esperantistoj devos mendi librojn de Esperanto-USA aŭ de aliaj libroservoj en Eŭropo kiel tiu de UEA, FEL aŭ Espéranto-France.

Kontaktu min se vi volas scii pli pri la diversaj taskoj necesaj por mastrumi la servon: normandfleury@esperanto.qc.ca

Speciala oferto por la membroj de KEA

La populara verko *La Eta Princo* reeldoniĝis en 2010 danke al kunlaboro inter Esperanto-France kaj la Kanada Esperanto-Asocio. La nova eldono estas vere bele presita, fortike bindita kaj kun la originalaj desegnaĵoj de la aŭtoro.

La baza vendoprezco estas 15\$. Mendu 2 ekzemplerojn kaj vi ricevos trian libron senpage. Vi verŝajne pensos ke vi ne bezonas 3 kopiojn de la libro. Prave! Kuniĝu kun samklubanoj, kun amikoj por grupa mendo aŭ proponu libron donace al komencanto aŭ amiko en alia lando.

Vi povas mendi rete kaj ni rapide sendos al vi la librojn kun fakturo kiu inkluzivos la sendkostojn. Por konsulti la retan katalogon de la libroservo de KEA:

www.esperanto.qc.ca/katalogo

Normand Fleury, Respondeculo de LS de KEA
libroservo@esperanto.qc.ca

Elekto de nova honora membro de KEA



Paul Hopkins

Ne estas troigo diri, ke sen li KEA apenaŭ ekzistus dum multaj jaroj. En la lastaj jaroj, li redaktis ĉi tiun bultenon. La estraro de KEA unuanime aprobis lian elektiĝon antaŭ du monatoj.

Paul naskiĝis 1958 en Viktorio, Brita Kolumbio (Kanado), kaj unue studis germanajn kaj slavajn lingvojn kaj literaturojn, sed poste doktoriĝis pri lingvistiko, kaj verkis doktoran disertacion pri la fonologio de la kasuba lingvo. Kiel lingvisto li ankaŭ okupiĝis multe pri indiĝenaj lingvoj de Kanado, precipe tiuj de la sališa lingvaro kaj la atabaska lingvaro, kaj traduke adaptis por esperant-lingva leganto pedagogian gramatikon de la laŝucida lingvo.

Paul komencis agadon en la Esperanto-movado kiel kasisto de la Esperanto-Klubo de Victoria en 1978, kaj baldaŭ poste (1979) elektiĝis prezidanto de la Junularo Esperantista Kanada. Tri restadoj en Germanio (1978, 1979 kaj 1980/81) konatigis lin kun la eŭropa movado kaj kondukis al tutjara stago kiel volontulo de TEJO en Centra

Oficejo de UEA/TEJO en Rotterdam (1981/1982) por la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, post kiu li elektiĝis estrarano de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo dum la IJK en Leuven. Havante la estraran taskon de landa agado, li fariĝis unua redaktoro de ties organo *TEJO Tutmonde*. Poste li dufoje reprezentis sian landon en la Komitato de UEA, kaj mult-jare agadis kiel interreta instruanto de Esperanto por kursoj de la baza kaj meza nivelo.

Paul ankaŭ agadis en la kanada Esperanto-movado, aliĝante al la estraro de Kanada Esperanto-Asocio en 1984, akceptante la postenojn de vicprezidanto (1985), prezidanto (1991), kaj sekretario (2000). Por KEA li redaktis plurajn eldonaĵojn: la Esperant-lingvaj bultenoj *Alumeto* (13 numeroj, 1992-2000) kaj *Lumo* (3 numeroj 1999-2001, 3 depost 2006), kaj la angla-lingva bulteno *Esperanto Update*, (20 numeroj, 1994-2003). Li fondis kaj daŭre prizorgas retan grupon ĉe Yahoo por kanadaj esperantistoj, esperanto-ca.

Paul nun loĝas en Kalgario (Alberto), kie li aktivis en la Kalgaria Esperanto-Rondo kaj ĝis lastatempe redaktis la revuon *Lumo* de Kanada Esperanto-Asocio libertempe, dum li perlaboras siajn viv-rimedojn kiel vendisto de mapoj plej divers-specaj en la entrepreno Map Town. Li kontribuas al la evoluado de la Esperanta Vikipedio sub la nomo kanadano.

Sinprezento de la novaj estraranoj de KEA

Ken Price (sekretario)

Vi legis pri mia agado en la Esperanto-movado sur la balotilo antaŭ kelkaj monatoj, do mi skribos malpli pri tio ĉi-foje. Mi naskiĝis en 1936 en Liverpool, Anglujo, kaj travivis la duan mondmiliton kiel infano. En 1953 mi eksciis pri Esperanto de lerneja amiko, kaj entuziasme eklernis ĝin, subtenante la ideon de 'facila' lingvo, kiun ĉiu povas lerni por tutmonda komunikado. En 1957 mi venis al Kanado por viziti parencojn de mia avo. Mi unue paŝis sur nord-amerika grundo en Kebeko, kiam la ŝipo, *Empress of Britain* aldokiĝis tie, kaj pasaĝeroj havis tri aŭ kvar vesperajn horojn por esplori tiun historian urbon, antaŭ ol la ŝipo daurigis la vojaĝon al Montrealo.


Mi ĝuis dusemajnan ferion kun miaj prageavoj, kiuj venis al Kanado antaŭ la unua mondmilito, en kabano en la lagregiono Kawartha, norde de Toronto. Mi restis ĉe ili dum du pliaj semajnoj en Toronto, dum kiu tempo mi kontaktis la UEA-delegiton Kriss Smilga, kaj la sekretario de la loka Esperanto-klubo, Dez Hackett. Pro rekomendo de la edzino de Dez Hackett, kaj konsilo de mia kuzo, mi esploris pri laborebleco en Toronto, kaj baldaŭ akiris postenon en kemia laboratorio. Mi ekaktivis en la loka movado, kaj post la refondo de KEA en 1958 partoprenis landajn kongresojn, kaj servis en la estraro kelkfoje.

Malgraŭ mia originala penso pri iom post ioma movado okcidenten por vidi aliajn landojn de la iama brita imperio, ĝis mi revenis al Anglujo, mi restis laboranta ĉe la sama kompanio dum 42-jaroj. Je la lasta tago de la pasinta jarcento mi iomete frue emeritiĝis, por eviti novan sistemon de ĉiusemajna ŝanĝado inter dumtaga kaj dumnokta laboro. Kun pli da libera tempo disponebla, mi komencis partopreni Esperanto-kunvenojn kaj kongresojn denove.

Kiam mi emeritiĝis, mi jam estis direktoro de kreditunio, kaj de komputila klubo, kaj akceptis inviton fari direktoro kaj oficiro de dek karitatemaj fondajxoj, en la sfero de 'socia loĝej-provizado,' alivorte subvenciitaj apartmentoj/domoj por familioj kiuj ne povas pagi la normalan luprezon. Mi ankaŭ restas korektanto/konsilanto por studentoj de la senpaga dek-leciona retroŝta Esperanto-kurso.

Se vi deziras legi (iomete) pli, rigardu mian retejon: www3.sympatico.ca/kenprice13

Yves Bellefeuille (kasisto)




Mi lernis esperanton kiam mi havis ĉirkaŭ 15 jarojn, kaj tiam komencis agadi en Junularo Esperantista Kanada, kiu tiam aktivis, kaj en la internacia junulara movado. Mi havis diversajn postenojn en TEJO, inkluzive de Ĝenerala Sekretario kaj estrarano pri kongresoj. Mi laboris volontule en la Centra Oficejo en Roterdamo du fojojn, en 1980 kaj 1993.

Mi estis komitatano de UEA por Kanado dum kelkaj jaroj. Nun mi ĉefe aktivis en la loka klubo. Krome mi estas kasisto de KEA ekde 2008. Mi estas advokato kaj laboras kiel revizianto de la oficialaj tradukoj de la Federacia Apelacia Kortumo, la Federacia Kortumo, kaj la Kanada Impoŝta Kortumo. Mi tre ŝatas Linuksen, precipe CentOS, kaj verkis kelkajn help-dokumentojn.

Raymond Brisebois

Lerninte Esperanton en 1980, Raymond estas delonge membro de kaj KEA kaj UEA kaj servis kiel vic-prezidanto de la landa asocio dum la mezaj 90-aj jaroj. Zamenhofologo, li kunordigantas la interretan *Hilelista Esperanto-komunumo* -n de post 2002, kaj redaktas ĉi ties organon, *Hilelisto*. En 2009 la Scienca Instituto Zamenhofa invitis lin kontribui artikolon al la unua Simpozio pri Homaranismo en La Chaux-de-fonds, Svisio, kaj poste li partoprenis la organiz-komitaton de la 2011-a simpozio samloka. Jam dudek kvar jarojn li laboras kiel provinca funkciulo (Ontario) en soci-serva programo financ-helpe por handikapuloj.

Geoffrey Greatrex (redaktoro de *Lumo*)



Geoffrey naskiĝis en Otavo sed junaĝe transloĝiĝis al Britio, kie li edukiĝis. Li lernis E-on en 1986 en la lernejo kaj poste aktivis en la brita junulara movado (JEB), kiel ankaŭ en EAB, la plenkreskula asocio. En la 1990aj jaroj li interesiĝis pri agado en Eŭropo kaj prezidis EEU dum du jaroj. En 1998 li revenis al Kanado, unue por instrui ĉe la universitato Dalhousie en Halifaxo, sed en 2001 li revenis al sia naskiĝurbo. Li daŭre restas en kontakto kun la brita kaj eŭropaj movadoj kaj regule ĉeestas UK-ojn.

Gregory Nacu

Mi naskiĝis en Kingstono, Ontario en 1981, kaj laboris kiel programisto por variaj firmaoj ĝis 2001. Mi lernis pri Esperanto de vikipedio en la vintro de 2007, kaj komencis lerni, ĉefe per LERNU! frue en 2008. Feliĉe por mi TAKE7 estis okazonta en Montrealo dum tiu somero. Mi studadis por lerni kiel eble plej multe antaŭ tiu kunveno. Sed kiam mi alvenis ja estis ŝoko. Unue mi ne sciis kiel vigla la Esperanto mondo estas, mi estis bone surprizita. Due, mi ne povis imagi kiel malsimila parolado kun veraj homoj estas ol farado de ekzercoj en la reto. Mi lernis multe. Sekva-jare en 2009 mi decidis partopreni la someran studadon en Slovakio. Tie mi pasigis du semajnojn plene en Esperantujo kaj subite komencis pensi esperante.

En 2011 mi kun multege da helpo de Normando bonvenigis proksimajn Esperantistojn al Kingstono por festi Mekaron. Ĉiu kiu partoprenis taksis ĝin bona sukceso. Dum la pasinta jaro mi verkis kelkajn artikolojn kiujn mi kontribuis al Kontakto gazeto, ĉefe je la temo de scienco. Kaj mi verkas artikolojn en mia persona blogo ĉe teknologio.net. En Kingstono estas ege malmultaj Esperantistoj, fakte, laŭ mia scio, mi estas la sola. Dufoje mi funkciigis kurson de Esperanto je la plej baza nivelo, tamen neniu el miaj lernintoj fariĝis Esperantistoj. Ĉi-jare mi decidis kandidatiĝi por la estraro de KEA ĉar mi volis helpi plivigli la asocion.

Bob Williamson (prezidanto)

Bob Williamson eklernis Esperanton dum la okdekaj jaroj post kiam li aŭdis anonceton en radio pri senkosta perposxta kurso. Antaŭ ol li finis ĝin, sub la gvidado de Kim Keeble, Bob jam fariĝis grupano de la Halifaxa diskut-rondeto sub la gvidado de Harry Lewis. Krom sia multjara servado en la estraro de Kanada Esperanto-Asocio, Bob redaktis la ĉiumonatan gazeteton 'Inter Ni' de la Halifaxa rondo dum la plejparto de ĝiaj 22 jaroj inter 1986 kaj 2008. Sian unuan Universalan

Kongreson li partoprenis en Bjalistoko je 2009. La sekvan jaron Bob fariĝis prezidanto de KEA.

Paul Hopkins

Jam juna Paul Hopkins aktivis en la kanada junulara asocio, Junularo Esperantista Kanada. Poste li aktivis en TEJO, de kiu li estis estrarano, kaj kies oficialan organon, *TEJO Tutmonde* li la unua redaktis. Li poste multe laboris en KEA, estante dum multaj jaroj estrarano kaj akceptante la postenojn kiuj devis esti plenigitaj kaj kiujn neniu alia volis akcepti. Por pli da detaloj pri la kariero de Paŭlo, bonvolu vidi paĝon 4.




MEKARO 2012 (Kebeko)

(Represita de *La Riverego* 108 kun afabla permeso.)

En la 'menuo': Esperanto, biero, turismo... kaj serĉado de perdita amikino!

Joel Amis


Kolektiĝis esperantistoj de Japanio, Usono, Francio kaj diversaj partoj de Kanado en Kebeko... Ĉu oni ŝanĝis la lokon kaj daton de la Universala Kongreso? Aŭ eble de la IJK? Fakte ne: temas pri nia 'regiona' renkontiĝo MEKARO — kies renomo evidente nun etendiĝas ĝis la alia flanko de la Pacifiko! Du esperantistoj — s-inoj ITABAŜI Micuko kaj ARAI Ĉitose — venis de Jokohamo, Japanio, por viziti nian belan kebekian ĉefurbon en varma (vere varma pro la nekutima 30-grada vetero en maja Kebeko!) Esperanta etoso kaj konatiĝi kun orienta kaj centra Kanado ĝenerale. Mi tamen devas iom hontigi miajn samlandanojn: la kvanto da japanaj vizitantoj egalas la kvanton da usonaj vizitantoj (kaj el tiu kalkulo mi ekskludas japanon kaj usonanojn loĝantajn en Kanado — unu el kiuj estas la aŭtoro)! Ŝajne Usono situas iomete pli proksime al Kanado ol Japanio! (Ne ofendiĝu, usonaj legantoj, mi simple volas instigi vin veni pli multnombre al ĉi tiu ĉarma turisma renkontiĝo ĉe la apuda najbaro!)



Kiel Particelli fariĝis Champlain

Ni komencis nian viziton enprofundiĝante en la historion de Kebeko sub la gvido de nia brava gvidanto Normando Fleury. Ekirinte de la Muzeo de Civilizacio, ni pluiris al la Reĝa Placo, kerno de la malnova urbo, kie ni vizitis muzeon pri la historio de la Reĝa Placo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo (ĝenerale la Malsupra Urbo de Kebeko). Tie ni spektis filmon (en la franca aŭ en la angla, laŭplaĉe) pri Samuel de Champlain, fondinto de Kebeko. Interalie, ni lernis ke la plej

famaj bildoj (pentraĵoj, statuoj, ktp.) de Champlain estas bazitaj ne sur lia vera aspekto, sed sur tute alia persono! Fakte neniu plu scias kiel Champlain vere aspektis — la vizaĝo kutime prezentita kiel lia efektive apartenis al Michel Particelli d'Émery, konsilisto de kardinalo Richelieu. Poste ni disiris por esplori la muzeon. En la kelo, kiu datiĝas de la 17-a jarcento, ni trovis reproduktitajn loĝĉambrojn de la epoko kaj tiutempajn vestaĵojn — kiujn oni rajtas provi! Mi ne povis rezisti la tenton vestiĝi kiel katolika pastro de la 17-a jarcento. Elektinte la plej grandan haveblan, mi baldaŭ konstatis, ke tiutempaj homoj ja pli malgrandis ol nun (necesis forte reteni la ventron por sukcese butonumi ĝin)!



Estas mi, Joel (la aŭtoro) —
ĉu vi ne rekonis min?..

Post plua esplorado de la Malsupra Urbo ni supreniris al la Supra Urbo per la funikularo, kiu grimpas la kabon, kiu apartigas la du urbopartojn. Ni promenis laŭ la promenejo, kiu superrigardas la Malsupran Urbon kaj la riveregon Sankta-Laŭrenco. Ni vizitis la monumenton al generaloj Wolfe kaj Montcalm — sufiĉe nekutima monumento, ĉar ĝi samtempe honoras la du generalojn (britan kaj francan) de du malamikaj armeoj, kiuj ambaŭ mortis dum la sama batalo. Ni finis la unuan tagon en la vegetara restoracio Commensal — sufiĉe tradicia kunvenloko por esperantistoj en Montrealo.

La sekvan tagon ni iom eliris el la centro de Kebeko al la indiana rezervejo Wendake, hejmo de la popolo hurona-wendat-a en Kebekio. Alveninte en ĉi tiu vilaĝo ni tuj komprenis, ke ni troviĝas en nekutima parto de Kebekio. Ne pro la konstruaĵoj — la domoj tie aspektas kiel tiuj, kiujn oni trovas tra la kebekia kamparo. Temis pri la haltoŝildoj: en Kebekio sur haltoŝildo kutime aperas la vorto « Arrêt » (halto). Foje en lokoj kun multaj anglalingvanoj aperas « Arrêt » supre kaj « Stop » sube. Sed ĉi tie ni rimarkis, ke supre aperas la kutima « Arrêt », tamen sube aperas ne « Stop » sed « Seten » — la vorto por « haltu » (aŭ « halto ») en la hurona. Ni tamen lernis de nia gvidisto, ke tiu lingvo, bedaŭrinde, ne estas aktive parolata aŭ komprenata de la nuntempaj loĝantoj de Wendake, kvankam oni klopodas iom post iom revivigi ĝin (la tieaj huronoj asimiliĝis al la franca lingvo antaŭ generacioj).




En Wendake ni vizitis la iaman domon de la tribestroj de la popolo, muzeon kaj preĝejon. Je unua rigardo la preĝejo aspektas kiel tipa malnovstila katolika preĝejo: statuoj de Jesuo, la Sankta Virgulino, diversaj sanktuloj, ktp. Tamen je pli proksima rigardo ni rimarkis certajn subtilajn diferencojn. Jen ĉe la altaro videblas neĝoŝuoj! Efektive, farado de neĝoŝuoj estas tradicia arto de ĉi tiu popolo — arto, kiu evoluis en modernan industrion, ĉar la huronoj de Wendake nuntempe produktas neĝoŝuojn el modernaj materialoj por vendi al diversaj sportvendejoj tra Nord-Ameriko kaj la mondo, kaj eĉ al la kanada armeo. Alia nekutimaĵo, kiu altiris nian atenton, estis statuo de indianino (en tre stereotipa



stilo, verdire — fakte tiom stereotipa, ke iuj el ni ne povis rezisti kromnomi ŝin « Sankta Pokahontas »... nu, post kiam ni jam foriris de la preĝejo, evidente !) kun kandeloj antaŭ ŝi — same kiel oni atendus vidi ĉe statuo de la Virgulino aŭ aliaj sanktuloj. Nia gvidisto klarigis al ni, ke temas pri indiĝena katolikino de la 17-a jarcento, Kateri Tekakwitha, kiu estis beatigita de papo Johano Paŭlo la 2-a kaj kiu estos deklarita sanktulino fine de 2012. Kvankam ŝi ne estis hurona (ŝi estis irokeza), ŝi estas tre grava por ĉiuj indiĝenaj katolikoj en Nord-Ameriko.

La antaŭtagmeza vizitado de la indiana vilaĝo sufiĉe stimulis nian apetiton — bonŝance la sekva halto en nia itinero estis bufeda tagmanĝo en Manoir Montmorency, apud la akvofalo Montmorency ! Tamen ni ne tute trankvilis : unu el ni — Amandine, franca staĝantino, kiu tiam loĝis ĉe Normando kaj Zdravka — ne sukcesis foriri kun la grupo matene. Malsimile al la plejparto de MEKAR-anoj, ŝi elektis loĝi en la centro de Kebeko, anstataŭ en la universitato Laval (malpli kostis kaj estis en pli interesa urboparto). Ŝi tamen ne sukcesis renkonti la grupon matene por iri al Wendake — do ni ne sciis kio okazis al ŝi... Feliĉe, kiam ni alvenis al Manoir Montmorency, Amandine jam atendis nin tie — evidentiĝis, ke ŝi eniris la malĝust-direktan buson (sekvos plia ĉapitro pri Amandine poste en mia artikolo). Do, malsataj ni alvenis al abunda bufedo en Manoir Montmorency. Eble estas pro naskiĝo en la sudoriento de Usono (kie bufedoj oftas), mi ĉiam aprezas bonan, abundan bufedon (eĉ se mia figuro ne tion aprezas) ! Krom multe da varia, bongusta manĝaĵo, la dekoro estis eleganta — eĉ se tro homplena (kion klarigas la fakto, ke la bufedo okazas nur unufoje semajne).



Abunde farĉitaj, ni eliris (aŭ elruliĝis) el la domego-restoracio por promeni al la akvofalo. La akvofalo Montmorency estas la plej alta en Kebekio, kaj 30 metrojn pli alta ol la akvofalaro Niagara (kvankam multe malpli larĝa, kompreneble). La malvarmeta nebuleto de la akvofalo agrable bonvenigis nin sub la nekutime varma maja suno. Kelkaj eĉ profitis de la okazomal-supreniri per longa ŝtuparo ĝis la malsupro de la akvofalo — duŝiĝante dum la malsupreniro.

Tiuj, kiuj malsupreniris povis resupreniri aŭ piede per la sama ŝtuparo, aŭ per telfero. Interese (kaj pravige por tiuj, kiuj malŝatas tiajn veturilojn), la sekvan tagon tiu sama telfero paneis, lasante homojn pendi dum kelkaj horoj !

Post tre aktiva tago, ni revenis al Kebeko por vespera trinkado / manĝado (ĉar multaj el ni ne volis multe manĝi post la taga « paŝtiĝado » en Manoir Montmorency) en la trinkejo-restoracio Trois Brasseurs. Sed tie atendis surprizo por multaj el la ĉeestantoj : naskiĝtaga festo ! Evidentiĝis, ke Karlo (Carlos González Ávila), konata al montrealaj esperantistoj kiel elstara vegana kuiristo, havis naskiĝtagon ĝuste en tiu tago (oni komentis, ke li estas sub la protekto de Ŝia Reĝina Moŝto Viktorino, ĉar lia

naskiĝo preskaŭ perfekte koincidis kun « Viktorina Tago » ! Iuj « elfoj » eksciis tion antaŭe kaj surprize alportis kukojn por la okazo !



Bedaŭrinde, ke MEKARO daŭras nur semajnfinojn, ĉar la fino venas tro rapide. La lasta okazaĵo de MEKARO estis vizito al la botanika ĝardeno de la universitato Laval. Kutime, por mi vizito al botanika ĝardeno ne estas la plej ekscita afero — ĉefe pro tio, ke mi ne scias multon pri plantoj (malgraŭ tio, ke mia patro scias ĉion pri plantoj). Sed la profesia gvidado de Normando, profesia botanikisto, malkaŝas neatenditajn sekretojn de la ĝardenoj. Mi ĉiam lernas multajn novajn aferojn, kiam li gvidas en kiu ajn ĝardeno — eĉ la nomojn de la plantoj en tri aŭ kvar (Esperanto, franca, angla — eĉ latina) lingvoj... kies nomojn mi konis eĉ ne en la angla !

Post la vizito al la botanika ĝardeno venis la tempo manĝi kaj disiri. Ni devis kolektiĝi en la manĝejo de apuda butikaro. Pro tio, ke ni grupe vizitis la botanikan ĝardenon, ni senprobleme trovis la lokon — malgraŭ tio, ke la manĝejo estis iom kaŝita en angulo, kaj do ne tute evidenta. Sed, momenton — kie estas Amandine ? Neniu vidis ŝin matene... Ĉu ŝi denove prenis malĝustan buson ? La tempo pasis, kaj ni pli kaj pli maltrankviliĝis — ŝi ja devis veturi reen al Montrealo kun Normando kaj Zdravka. Pasis pli da tempo — ankoraŭ neniun signon de Amandine. Zdravka, kiu ĉiam patrinece zorgas pri ni ĉiuj, maltrankvilegiĝis pro zorgoj — ŝi ja klare indikis la tempon kaj lokon... kion fari, se Amandine ne aperos ĝustatempe ? Ŝi havis nek telefonon, nek (kiel ni poste eksciis) monon ! Sed ni ja ne povis atendi la tutan tagon.

Nu, eble ŝi revenis al la universitato — almenaŭ indas kontroli... Do, ni (mi, Ĵenja, Karlo González kaj Den Drown) reiris al la universitata loĝejo por kontroli, ĉu Amandine estas tie. Neniu ŝpuro de ŝi... Verŝajne ŝi devos petveturi reen al Montrealo... Bedaŭrinde... Ni do ekiras reen, ne povante ion fari. Tamen Ĵenja ekrigardas tra la aŭtofenestro al la apuda bushaltejo... ĉu povas esti? Jes! Estis Amandine! Mirakle ni retrovis ŝin! Evidente la bonŝanco estas kun ŝi!

Ĉu mi sukcesis konvinki vin pri la bonecoj de MEKARO? Se jes, vi denove havos okazon partopreni ĝin venontjare, kiam la ĉefurbo de Kanado, Otavo, gastigos la eventon. Mi vidos vin tie!

Financa raporto de KEA 2010

Legantoj eble scivolemas, kial temas pri raporto de 2010, ne 2011. Ja estas iom malfrue, sed oni ankoraŭ ne publikigis tiun raporton en la revuo. Cetere, oni ne finaprobis la raporton por 2011, kiun do ni eldonos en la jarfina numero.

Bilanco fine de 2009

Aktivo:	
Banko	9830,48
Konto ĉe UEA	104,66
Konto ĉe FEL.....	61,93
Kontoj libroservo	7669,13
Antaŭpagitaj elspezoj (noto 1)	255,01
Libraro Ludovika	7340,00
Fondaĵo ĉe Victoria Foundation (noto 2)	37280,25
Librostoko	10298,00
Librovendoj pagotaj	716,40
Sume (noto 1)	73555,86
Pasivo:	
Kapitalo (noto 1).....	25601,76
Rezervo dumvivaj membroj	43200,00
Rezervo prizorgo libraro	4754,10
Sume (noto 1)	73555,86
Enspezoj:	
Kotizoj	1282,50
Donacoj	1769,43

Rentumo/Investaĵoj (noto 2)	3242,95
Perado de revuoj (noto 3)	-82,23
Vendo de libroj	2700,69
De rezervoj	3000,00
Aliaj enspezoj	629,41
Sume	12542,75
Elspezoj:	
Lumo	1971,59
Pago al UEA	132,24
Banko-kostoj	117,32
Labor-kostoj	217,08
Al rezervoj	300,00
Aĉetoj libroservo	1912,72
Aliaj elspezoj	1123,44
Sume	5774,39
Gajno	6768,36
Bilanco fine de 2010	
Aktivo:	
Banko	11725,33
Konto ĉe UEA	90,18
Konto ĉe FEL	31,50
Kontoj libroservo	7673,72
Libraro Ludovika	7340,00
Fondaĵo ĉe Victoria Foundation (noto 2)	39408,20
Librostoko	11178,24
Librovendoj pagotaj	247,61
Sume	77694,78
Pasivo:	
Kapitalo	25601,76
Rezervo dumvivaj membroj	40200,00
Rezervo prizorgo libraro	4754,10
Instrua fondaĵo	300,00 (noto 4)
Ŝuldata al posto	70,56
Gajno	6768,36
Sume	77694,78

Noto 1: Tiuj sumoj estis misraportitaj en la financa raporto de 2009. La ĝustaj sumoj aperas en tiu ĉi raporto, kaj sekve ili malsamas de tiuj en la antaŭa raporto.

Noto 2: En 2006, KEA starigis fondaĵon ĉe Victoria Foundation. Victoria Foundation tenas la kapitalon de tiu fondaĵo por KEA kaj investas ĝin; KEA rajtas ricevi la profiton, sed ne la kapitalon. Dum la jaro 2010, la rezulto de la fondaĵo estis +8,7%, aŭ gajno de \$ 3243.

Noto 3: La 'enspezo' pro perado de revuoj estas negativa pro kotizoj ricevataj de abonantoj en 2009 kaj senditaj al la revuoj nur en 2010.

Noto 4: Dum la jaro, la estraro kreis Instruan fondaĵon, 'kies celo estas doni subvenciojn por finance helpi partoprenon de homoj loĝantaj en Kanado en kursoj pri esperanto, en Kanado aŭ eksterlande.'

Financa raporto de la libroservo

(Laŭ informoj de Normando Fleury)

Bilancio fine de 2009	
Librostoko	10298,00
Bankokonto	7596,45
Eta kaso	117,74
UEA-konto	-45,06 (EUR -28,42)
Ŝuldata pro vendoj	716,40
Sume	18683,53
Enspezoj:	
Korekto de eraro pri bankokonto	169,37
Vendoj	2806,38
Kurzo-diferencoj	4,78
Repagitaj sendokostoj	349,49
Rentumo	0,08
Enspezoj sume	3330,10
Elspezoj:	
Aĉeto de varoj	912,72
Afranko	383,26
Dogano	259,56
Administrado	229,00
Bankokostoj	97,52
Ministerio	32,00

Elspezoj sume	2914,06
Profito	416,04
Bilancio fine de 2010	
Librostoko	11178,24
Bankokonto	7778,89
Eta kaso	177,39
UEA-konto	-282,56 (EUR -206,84)
Ŝuldata pro vendoj	247,61
Sume	19099,57

Anonco pri lastatempa libro (en la anglaj kaj en Esperanto) de la prezidanto de UEA

Se vi iros al la retpaĝo de delhia eldonisto nomata samskriti (vorto signifanta la kulturon en pluraj barataj lingvoj), <http://www.samskritibookshelf.com/> kaj tie serĉos la titolon *Inhabiting human languages: the substantivist visualization* aŭ la parton antaŭ la dupunkto, vi trafos la anglan version de mia inter vi pli bone konata *Loĝi en homaj lingvoj: la substancisma perspektivo*. La libro, same en la angla kiel en esperanto, estas (iom intelektoce verkita, sed laŭ pluraj raportoj sufiĉe legebla) manifesto prezentanta mian aliron al la esperantismo.

Povas esti, ke iu/j volos mendi ĝin. Sekvu la indikojn sur la retpaĝo kaj vi devus sukcesi fari mendon. Se vi sendos mesaĝon kaj ne ricevos respondon eĉ post du semajnoj, bonvolu tion transdiri al mi, kaj mi provos telefone kontakti la eldoniston.

Probal Dasgupta, probal53@gmail.com

Germana Reta Ekspozicio

La plan-lingva ekspozicio de Bavara Ŝtata Biblioteko malfermita meze de junio nun videblas en virtuala formo en la reto:
<http://www.bsb-muenchen.de/Virtuelle-Ausstellung-Konstruierte-Sprachen.3570.0.html>

Ndir: evidente, la retejo estas en la germana lingvo, sed ĝi ja belas kaj vidindas.

Apero de libro de tradukoj en la anglan de esperantaj verkoj

Mi ĝojas anonci, ke eblas nun favorpreze akiri la dulingvan esperantan/anglan antologion *Star in a Night Sky* antaŭ ties venontmonata publikigo. Vi povas trovi ĝin: http://www.francisboutle.co.uk/product_info.php?products_id=97 kaj mendi pere de la eldonejo Francis Boutle.

Memorindas, ke la antologio fariĝos grava propagandilo por montri al anglalingvanoj, ke Esperanto posedas originalan literaturon kaj buntan historion. Mi esperas, ke ankaŭ neesperantistoj uzos la antologion kiel legolibron enhavantan diversajn - kaj foje nekonatajn - tekstojn en Esperanto.

Paul Gubbins (Britio)

NDIR: Paŭlo, jam bone konata en Esperantujo pro siaj teatraĵoj, ĵus eldonis sian propran anglalingvan romanon, titolitan *Laddies and Generalmen* (New Generation Publishing).

Revo de infanoj

de Ĵenja Amis

Mi konatiĝis kun François Hounsounou antaŭ ok jaroj dum TEJO-seminario en Francio. Li estis ege entuziasma pro sia unua eŭropa vojaĝo kaj li regalis nin per afrikaj bongustaĵoj. François estas daŭre entuziasma kaj aktiva esperantisto, kaj li ĵus trapasis ekzamenon por fariĝi lernejestro. Jam ekde kelkaj jaroj François aktivis kadre de neregistara Esperanta organizo Afrika Centro Moncivitana (ACM) kaj organizas internacian kampanjon 'Revo de infanoj' por kolekti materialojn por lernejoj, ĉefe, por helpi al orfoj, stratinfanoj kaj handikapuloj. Mi donacas al la kampanjo ĉiujare, kaj ŝatus peti ankaŭ vin sendi al ACM diversajn lernejajn necesajn, ekz., kajerojn, kraĵojn, skribilojn, not-paperejon, librojn, revuojn (Esperante aŭ france) ktp. La disdono de la donacoj okazos ĉi-oktobre, sed poŝta sendado al Benino foje daŭras kelkajn monatojn. Mondonacoj per UEA ankau eblas (hufs-j). Via nomo, kompreneble, aperos en la listo de donacintoj, kaj la infanoj el Benino estos ege dankemaj pro via donaco !

Adreso: Afrika Centro Mondcivitana/ACM, BP 226 Lokossa-Mono, Rép. du Bénin
esperantoawc_benino@yahoo.fr au acmbenin@gmail.com

Pli da informoj : www.bit.ly/revedenfant

Fotoj : www.ipernity.com/doc/42310/home/photos

Anstataŭoj por keramikaj krudmaterialoj

de Edouard Bastarache



Sekvas relative teknika artikolo pri libro de la aŭtoro pri lia fako, kiu aperis en 2003. Troveblas en ĝi iuj fakterminoj, kiujn oni ne trovas eĉ en NPIV, sed konsulteblas en la reto fakvortaro, http://www.dinoclay.com/mdpw/MDPW_English_Esperanto_French.pdf

Ĉar substituado por kompleksaj krudaj keramikaj materialoj necesigas kalkuladojn nekonatajn al pluraj potistoj, kaj ĉar ni trovis manierojn anstataŭigi la plejparton el tiuj ĉi, ni ofertas al la keramikista komunumo la rezultojn de niaj enketoj.

Tiu ĉi enketprojekto tre spontane naskiĝis dum kalkulado por anstataŭigi spodu-menon per litia karbonato, kaolino, kaj siliko. Nia aliro taŭgas por tiuj, kiuj ne konas glazurkemion kaj por tiuj, kiuj ne posedas komputilon. Tiu ĉi enketo fariĝis inter 1993 kaj 1995, antaŭ la disvastiĝo de glazuro-softvaroj kaj hejmaj personaj komputiloj. Eĉ nun, nur 20% de hejmoj en Kebekio havas komputilon, kaj nur 6% havas konekton al la Interreto (1998).

Post la sukceso de nia unua substituado de spodumeno, la rezultoj sendiĝis al W. Hunt, redaktisto por *Ceramics Monthly*, kiu multe ŝatis nian metodon. Lia letero de la 19a de majo de 1993 multe entuziasmigis nin : 'Mi multe ŝatis ke vi sendis al ni tiun ĉi fascinan diskuton pri substituado de 3 spodumeno. Kun via permeso, mi ŝatus uzi partojn el ĝi en nia rubriko de Leteroj.' Sekve ni decidis apliki nian metodon al substituado al feldspatoj, feldspatoidoj, kaj aliaj krudaj materialoj, kiel vi vidis poste. La rezultoj sendiĝis al W. Hunt popece, ĉapitro post ĉapitro, dum novaj hipotezoj venis al ni en la kapo. Sekve la 17an de marto de 1994 li sendis al ni la finajn komentojn pri tio, kion ni jam sendis. La ĉapitro pri lepidolito skribiĝis post la ricevo de lia lasta letero, sed la sama metodo aplikiĝis.

Ni uzis ĝeneralajn formulojn anstataŭ kompleksaj analizoj kaj transportis 3 decimalspacojn, rondigante la kvaran al la tria. Ni uzis la nocian oksidon KNaO. Ni ankaŭ uzis kelkajn personajn lertaĵojn. Nia celo estis elserĉi substituadojn en kiuj novaj unuigo-formuloj estis tiom proksimaj kiel eble al la originalaj; tion ni atingis ĉiufoje.

Ĉar la formuloj de feldspatoj kaj feldspatoidoj estas iom similaj al tiuj de glazuroj, ni uzis tiun ĉi lastan principon por trovi taŭgajn substituojn. La ideo estis konsideri la kompleksajn alsubstituendajn materialojn kiel unuiĝo-formulojn por glazurbazoj, konvertendajn al receptoj, kaj sekve ni dividis ilin per 100 por facila insertiĝo en glazurreceptojn.

Laŭ la metodo por glazurkalkulado, *Glaze calculation, theory and objectives; Glaze calculation using materials containing more than one oxide* kaj *Calculating glaze formulas from batches or recipes* (Daniel Rhodes, *Clay and glazes for the potter*, reviziita eldono, 1973), ni uzis diversajn materialojn por atingi nian celon, kiu estis fari mikson kiu havus, post bakfornado, la formulon de feldspatoj kaj feldspatoidoj.

Kompreneble kelkaj etaj alĝustiĝoj necesis, per la metodo de provo kaj eraro (sur matematika bazo), al la rezultoj de la unua provo (unua anstataŭo) por atingi satigan alĝustiĝon. Tiam, kiam necese kaj/aŭ eble, la rezultoj de la dua provo (dua anstataŭo) proviĝis kelkfoje plu en diversaj receptoj por forigi eventualajn bonajn rezultojn nur pro ŝanco.

Fine ni aplikis nian metodon al materialoj multaj malpli kompleksaj ol feldspatoj kaj feldspatoidaj materialoj.

Eblas, ke Dulingvismo Malrapidigas La Aperon de Demenco en la Maljuna Aĝo

verkis Steĉjo Norvell

Lastatempe onidiro furoras inter esperantistoj, ke la lernado de dua lingvo iel ŝirmas maljunulojn kontraŭ la malsano de Alzheimer. La precipa fonto de tiu informo estas esploradoj faritaj de D-ro Ellen Bialystoko (tiu vere estas ŝia nomo) kaj kolegoj ĉe la Memor-Kliniko, Malsanulejo Baycrest por Maljunuloj, en Toronto kaj eldonitaj en diversaj sciencaj artikoloj^{1, 2, 3} kiuj aperis en la pasinta jardeko. Ŝajnas taŭge, ke esperantistoj havu ĝustan scion pri la medicinaj malkovroj por ĝuste kompreni kaj inteligente diskuti kaj disvastigi informon pri la afero.

Fon-Info

Unue, ni reviziu iom el la koncerna fon-informo. Diversaj studoj montris, ke inter 10% ĝis 40% el la mortinoj, kun milda ĝis severa atestaĵo de la malsano de Alzheimer en la cerbo ĉe nekropsio, ne montris demencon, eĉ en la lastaj jaroj de la vivo^{5, 6, 7}. Oni atribuas tiun ŝajnan reziston de la cerbo al la efikoj de la malsano de Alzheimer

al “cerba retenaĵo”. Esploristoj distingas inter du specoj de cerba retenaĵo: *biologia* cerba retenaĵo (kiu povas esti genetika, almenaŭ parte) kaj *konduta* cerba retenaĵo – la rezulto de la dumvivaj faroj de la individuo. Bialystoko nomas ĉi lastan “pensa retenaĵo” (angle, “cognitive reserve”), kaj en tiu ĉi artikolo ni uzos tiun terminon.

La malsano de Alzheimer estas la plej ofta kaŭzo de demenco en la maljuna aĝo. Tamen, aliaj malsanoj (ekzemple, cerebroarteria malsano), kiuj kondukas al demenco, kondutas simile al la malsano de Alzheimer^{1, 3}. Kiam temas pri pensa retenaĵo, sociaj, mensaj kaj fizikaj aktivoj havas bonan efikon en ĉiuj specoj de demenco, ne nur en tiu pro la malsano de Alzheimer⁴. Pro tio, oni rajtas grupigi la kaŭzojn de demenco surbaze de la demenco mem; tio estas, por la nuna studo ne necesas fari nekropsion por precize klasifiki la patologiajn trovaĵojn en la cerbo.

Ne povas esti surprizo, ke homoj kiuj multe uzas la menson dum kaj juna kaj maljuna aĝoj havas pli da pensa retenaĵo, kaj pro tio povas pli sukcesoplene rezisti demencon en la lastaj vivjaroj. Valenzuela kaj Sachdev⁷ traserĉis la literaturon kaj kombinis statistikojn el 22 taŭgaj studoj – statistika tekniko konata kiel “meta-analizo”. En 29000 pacientoj ili montris, ke la malokazo de demenco estas forte rilata al antaŭa inteligenteco kaj mensa aktivo. Flanke, oni kutime mezuras mensan aktivon per eduka nivelo kaj la postuloj de la profesio. “Sociala klaso” (se tiu eĉ ekzistas) kaj ekonomia stato tute ne gravas.

Studoj de Efikoj de Dulingvismo en La Memor-kliniko

Bialystoko kaj kolegoj studis la registraĵojn de 228 sinsekvaj pacientoj kiuj estis de kuracisto sendataj al la Memor-kliniko por konsulto pri scio-problemoj en la jaroj 2002 ĝis 2005¹. Por ĉiu paciento oni akiris kompletan medicinan antecedenton, faris kompletajn korpajn kaj mensajn ekzamenojn, faris diversajn radiologiajn ekzamenojn, sangotestojn, ktp. Neŭrologo detale ekzamenis ĉiun pacienton.

Oni strebis klasifiki la pacientojn, ĉu ili estis unulingvaj aŭ dulingvaj. Ĉiuj flue parolis la anglan. Unulingvanoj parolis nur angle. Por esti klasifikita kiel dulingvano, la paciento devis esti ĉiutaga kaj multjara parolanto de kaj la angla kaj la gepatra lingvo. Estis entute 25 gepatraj lingvoj, la plej oftaj el kiuj estis la pola, la jida, la germana, la rumana, kaj la hungara. (En la studo, oni eĉ ne pripensis kapablon paroli pli ol du lingvojn.) Evidentas, ke la plejparto el la dulingvanoj estis enmigrintoj.

Necesis elimini multe da pacientoj el la studo por ke la du grupoj estu, krom lingvomulteco, kompareblaj. Ekzemple, se oni ne povis klare decidi ĉu la paciento estas unulingva aŭ dulingva, ŝi/li ne povis esti en la studo. Alia ekzemplo de

eliminado: se virino ne laboris ekster la domo, necesis malinkludi ŝin, pro tio ke ne eblis mezuri la postulojn de la profesio. En la fino, la du grupoj, unulingvanoj kaj dulingvanoj, estis pli-malpli kompareblaj. Craik kaj aliaj, en pli lastatempa restudo de la sama datenaro³, elmontris, ke la eduka nivelo de la unulingvanoj estis fakte iom pli alta ol tiu de la dulingvanoj.

Bialystok¹ citis kaj emfazis la trovaĵon de Vanzuela kaj Sachdev⁸ kaj aliaj, ke tre gravas mensostimulaj libertempaj aktivoj, kaj ke tiuj estas *sendependaj* de eduka nivelo kaj intelektaj postuloj de la ĉiutaga laboro.

En la fino restis 184 pacientoj en la studo, el kiuj 91 estis unulingvaj kaj 93 estis dulingvaj. El la 184 pacientoj en la studo, 132 suferis la malsanon de Alzheimer kaj 52 suferis alian cerbo-degeneran malsanon, kun aŭ sen la malsano de Alzheimer. Oni eltrovis, ke unulingvaj pacientoj montris la unuajn simptomojn de demenco en aĝo 4 jarojn pli junaj ol la dulingvaj pacientoj. Post la apero de simptomoj, la rapido de progresado de demenco estis identa en la du grupoj.

Oni povas sin demandi, kial estas avantaĝo en dulingvismo. Bialystok kaj kunaŭtoroj diskutas tiun aferon en pli lastatempa eldonaĵo². Ili konjektas, ke plej gravas pri tio la kapablo ŝalti unu lingvon kaj malŝalti alian. Ili donas atestaĵon, ke tiu kapablo – “direktora regado” – troviĝas en la frunta lobo de la cerbo. Ili supozas, ke forta ŝaltkapablo aŭ direktora regado estas utila por multe da diversaj mensaj aktivoj.

Taksado

Rimarkinde estas ke: 1) La studo ne estas anticipa; 2) pacientoj ne estas hazarde asignitaj al unu grupo aŭ la alia. Konfese, ambaŭ el ĉi tiuj postuloj estus tre malfacile plenumi, sed tiaj estus necesaj por ke moderna studo estu statistike konvinka. 3) Oni rajtas esti suspektema, ĉu la pli granda kvanto da enmigrantoj en la dulingvana grupo iel distortas la rezultojn. Ankaŭ rimarkinde: 4) La nombro de pacientoj en la studo estas relative malgranda; 5) la diferenco en la rezultoj ne estas granda – *grava* jes, sed granda ne; 6) dulingvismo nek malebligas la malsanon de Alzheimer nek malrapidigas la progreson de la simptomoj post la ekapero de la demenco.

Literaturo:

1. Bialystok E, Craik FIM, Freedman M, Bilingualism as a protection against the onset of symptoms of dementia, *Neuropsychologia* 45, 2007, 459-64.
2. Bialystok E, Craik F, Luk G, Cognitive control and lexical access in younger and older bilinguals, *Journal of Experimental Psychology: Learning, Memory and Cognition* 2008; 34, 4, 859-73.

3. Craik FIM, Bialystok E, Freedman M, Delaying the onset of Alzheimer disease, *Neurology* 2010; 75, 1726-29.
4. Fratiglioni L, Paillard-Borg S, Winblad B, An active and socially integrated lifestyle in late life might protect against dementia, *Lancet Neurology*, 2004, 3, 343-53.
5. Mortimer JA, Brain reserve and clinical expression of Alzheimer's disease, *Geriatrics* 1997, 52, S50-S53. Citita de Bialystok, Craik kaj Freedman (1).
6. Medicina Esplor-Konsilio de la Unuiĝinta Reĝlando (UK Medical Research Council), citita de Vanzuela kaj Sachdev, 2006, apr. (6).
7. Valenzuela MJ, Sachdev P., Brain reserve and dementia: a systematic review, *Psychol Med.* 2006 Apr, 36(4):441-54. Epub 2005 Oct 6.
8. Valenzuela MJ, Sachdev P., Brain reserve and cognitive decline: a non-parametric systematic review, *Psychol Med.* 2006 Aug, 36(8):1065-73. Epub 2006 May 2.

Foto de kelkaj el la multaj Kalgarianoj:




Jen ĉiulunda kunveno de la Kalgaria Esperantista Rondo. Estas preskaŭ cent membroj, sed kompreneble ne ĉiu povas ĉeesti ĉiun kunvenon. La nomoj de unuopuloj en la foto, de maldekstre, laŭhorloĝe: Chris (Kriĉjo) Harris, Meredith Simon, Stan Tatka, Marie Rudna, Daphne Ilieva, Gilles La Rochelle, Paŭlo Hopkins, Milan Sveda, Maria Hopkins, Allan Simon, Charles (Karlo) Donald.

Dum la Kanada festo-tago (2a de julio) membroj de Kalgaria Esperanto-Societo memoris siajn pionirojn per vizito al la tombejoj de Dorothy Hawley kaj Janet Warren. En la foto, Maria Hopkins (prezidanto de KES) tenas Esperanto-flagon ĉe la memoras-ŝtono de Janet Warren.



Alia foto de la memor-ekskurso de Kalgaria Esperanto-Societo. En ĉi tiu foto, Daphne Ilieva staras apud la tombo-ŝtono de Dorothy Hawley, Honora Membro de Kanada Esperanto-Asocio. Daphne multe helpis al Dorothy dum la lastaj jaroj de ŝia vivo.



Ĉe la lundaj kunvenoj de Kalgaria Esperanto-Societo homoj de ĉiuj aĝoj kune lernas Esperanton. En ĉi tiu foto, Aurora, sursine de ŝia patro Jason Donev, ekzercas sian provizon de Esperanto-vortoj, dum blank-hara Gilles apude parkerigas la novajn vortojn.

La Eduka Fondaĵo 'Carson'

La Eduka Fondaĵo 'Carson' estis oficiale registrita kiel karitata societo laŭ la leĝoj de la provinco de Brita Kolumbio la 19-an de januaro 1984. La celo de la societo estis akcepti de Chuck Carson la donacon de \$70,000.00 dolaroj kaj aldoni pli da donacoj al tiu sumo, por krei fondaĵon kiu subtenas per subvencioj la edukadon de la homoj speciale rilate al lingvaj aferoj. La statutoj de la fonda dokumento specife menciis ke la fondaĵo kunlaboras kun la Universala Esperanto-Asocio, kaj kun naciaj Esperanto-asocioj.

La advokato kiu preparis la leĝajn dokumentojn por la asocio estis Jack Woodward, kiu estis ankaŭ adepto de la Lingvo Internacia, Esperanto. La unuaj direktoroj de la societo estis: Wallace G. du Temple, Olga du Temple, Barry G. du Temple, Kirk Crockett, kaj Myra Larsen. La direktoroj kandidatigis kvar kuratorojn por la Eduka Fondaĵo Carson: Wally du Temple, Myra Larsen, Jean Smythe, Allan Simon, kaj Anne Neave. Ĉiuj akceptis la postenojn.


La kuratoroj kunvenis por fari laborplanon kaj por dividi la taskojn inter si. Ili preparis artikolojn por la revuo *Esperanto* de UEA kaj por la revuo *Lumo* de KEA kaj por aliaj naciaj Esperanto-gazetoj. Petantoj por subvencioj devis subskribi juran kontrakton kaj petformularon antaŭ atestanto ŝtata. Se la kontrakto ne estus tute plenumita kaj akurate kaj priskribe, la sumo de la subvencio devus esti resendita.

La Fondaĵo subtenis la eldonon de lernolibroj, vortaroj, korespondaj kursoj, vidbendoj, kaj instruaj materialoj por Esperanto-instruistoj. La Fondaĵo ankaŭ subtenis la kreon de la vidbendaj kursoj, 'MAZI' kaj de la vidbenda kurso 'Pasporto Al La Tuta Mondo'. La Fondaĵo provizis stipendiöjn por ĉeesti kursojn, por fari instruvojaĝojn, aŭ por presi varbobroŝurojn pri Esperanto. Projektoj subvenciitaj inkluzivis eldonon de Esperanto-rokmuzika kompaktdisko, novajn lernolibrojn por german- kaj por sinhal-lingvanoj, kaj kursojn en pluraj landoj de Centra Ameriko, Sud-Ameriko, Afriko kaj Azio.

La kuratoroj baldaŭ lernis ke estis necese kontakti ' eminentajn geesperantistojn ' en la diversaj landoj por certiĝi pri la fidindeco de la petantoj kaj la indeco de la proponitaj projektoj por la tiea lando. Homoj petis ke EFC aĉetu por ili biciklojn, ripozlokon, insulon, terpecon, muelilon, luon de klubejoj. Pro tio la direktoroj decidis rifuzi petojn por ekipaĵoj kies uzo la kuratoroj ne povis kontroli kaj kiuj devus esti la respondeco de lokuloj. Multaj leteroj por rifuzi petojn ni devis skribi ĉar ni ne sufiĉe frue informis pri la specoj de 'projektoj' kiujn ni certe ne akceptus.

Venontaj reklamoj pri EFC kiuj aperis en E-revuo informis pri la specoj de projektoj kiuj havas la plej bonan ŝancon de aprobo. La kuratoroj emfazis ke projektoj devis pruvi pere de buĝeto ke pli ol duono de la kosto de kiu ajn projekto devus esti pagita per aliaj fontoj, ĉu asociaj aŭ personaj.

Dum dek unu jaroj, Eduka Fondaĵo 'Carson' el Kanado distribuis pli ol 60,000 kanadajn dolarojn por subteni edukajn projektojn en multaj landoj. En la jaro 1995 la direktoroj decidis elĉerpi la tutan sumon de la Fondaĵo dum du jaroj.




Kiam Chuck Carson faris sian senkondiĉan donacon al Wally du Temple li diris simple, "Faru grandan aferon por la antaŭenigo de Esperanto". Li diris ke mi elspezu ĉion rapide por ke la Movado de Esperanto pli rapide progresu. Kiam la societo Eduka Fondaĵo 'Carson' finis sian laboron en 1997 ĝi donacis la reston de la kapitalo al la Kanada Esperanto-Asocio.

Jen kelkaj statistikoj pri la projektoj subtenitaj de la EFC. Entute la kuratoroj disdonis \$121,291.00 dolarojn por 79 projektoj (meze \$1535.00). El la 79 projektoj EFC subtenis 43 projektojn en Eŭropo, 14 en Norda Ameriko, 9 en Azio, 7 en Afriko, kaj 6 en Centra kaj Suda Amerikoj.

Sed oni priatentu la fakton ke ofte la finaj ricevantoj de la subvencio troviĝis en aliaj landoj. Ekzemple la 'eŭropaj' subvencioj inkluzivis instruvojaĝojn al Afriko kaj Azio, dissendon de gazetoj kaj libroj al Afriko kaj Azio, instruvojaĝojn al Suda Ameriko kaj simile. Entute 65 projektoj finiĝis sukcese antaŭ 1997. Sep projektoj daŭris sukcese post la lasta kunveno de EFC. Du ricevintoj de financa subteno redonis la donacitan monon pro ne eblo fini siajn projektojn. Kvin ricevintoj trompis la kuratorojn, akceptis la monon, neniam raportis pri progreso kaj ne respondis al postuloj repagi la subvenciojn. Pro distanco kaj kosto la kuratoroj ne procedis kontraŭ tiuj trompuloj.

La kuratoroj decidis okazigi la lastan kunvenon de EFC en la vilaĝo Klajmeks (Climax) en la provinco Saskaĉevano, kie Chuck Carson vivis dum siaj lastaj jaroj. Myra Larsen ne povis veni por tiu lasta kunveno kaj pro tio la ĉeestantaj kuratoroj Klajmeks. Ni kunportis ekzemplerojn de diversaj lernolibroj, terminaroj, vortaroj, kaj kursoj kiuj estis sukcese produktitaj de la projekto. Tiel ni montris kiel grava estis la donaco de Chuck Carson. Ni ankaŭ rakontis la li pri la Esperantaj instruvojaĝoj de Eŭropo al la Amerikoj, Azio, kaj Afriko. La urbestro regalis nin per kelkaj manĝetoj kaj trinkaĵoj, kaj donis al ni memoraĵojn pri sia vilaĝo, pinglojn kaj

poŝtkartojn. Poste li gvidis nin la la tombejo kie Chuck nun kuŝas. La kuratoroj regalis la tombon de Chuck per floringo, kiu surhavis la vorton 'Dankon'.



Ni sendas al vi kvar fotojn, La unua foto montras la tomboŝildon kiu diras Charles Earl Carson 1910 – 1985. La dua foto montras Wally, Jean, Allan kaj Anne metante la floringon sur lian tombon. En la tria foto ni montras al la urbestro la bonajn produktaĵojn de diversaj projektoj. Per la kvara foto ni montras al vi la modestan kaj tre etan domon de Chuck Carson kiu donis \$70,000.00 al EFC, \$50,000.00 al KEA,

\$100,000.00 al la vilaĝo de Klajmeks por konstrui naĝejon por infanoj, kaj la reston de sia havaĵo al UEA.



NEKROLOGOJ

Lorne Guy Erickson naskiĝis je sabato la 25a de decembro 1943 kaj forpasis merkrede la 1an de decembro 2010. Funebra Servo okazis je sabato la 4a de decembro 2010 en Mervin United Church, kaj li estas enterigita en Mervin Cemetery, Mervin, Saskaĉevano.

Myra Larsen

Olive kaj Ernest Orr estis la geaptroj de Myra Larsen. Ili loĝis en Fawcett, Alberta kiam Myra naskiĝis je la 16a de januaro, 1927. Myra mortis la 7-an de majo, 2012 en Saanichton, Brita Kolumbio. Wally du Temple estis invitita de la familio Larsen fari la oficialan panegiron, la solenan kaj laŭdan paroladon.

En la jaro 1946 Myra Orr edziĝis kun George Larsen. Ili konstruis sian hejmon en Saanichton, B.C., kie ili gvidis kvar infanojn al plenkresko kaj maturiĝo: Allan, Barry, Kathy kaj Thaylin. Dum multaj jaroj Myra laboris kiel la estro de la poŝtoŝtelo de Saanichton, B.C. Ŝi havis fakte tre longan karieron.

Myra ŝatis vojaĝi, kaj faris diversajn vojaĝojn kun George. Dum tiuj vojaĝoj ŝi renkontis lingvajn problemojn, aparte en Finnlando. Kiam Wally du Temple foje eniris ŝian poŝtoŝtelon en 1972 portante diversajn pakaĵojn kaj leterojn kiuj surhavis 'Esperanto' etiketojn, Myra tuj enketis pri kio temas. Rapide Myra decidis lerni Esperanton. Ŝi registris en kurso gvidita de Wally kaj fariĝis adepto de la Lingvo Internacia, Esperanto. Myra ne hezitis informi homojn en la poŝtoŝtelo pri Esperanto kaj ties utilo. Ekestis la unua Esperanto-poŝtoŝtelo kie la poŝtestro povis komuniki per Esperanto.

Ek de tiam Myra Larsen vojaĝis al internaciaj renkontiĝoj por Esperantistoj. Myra estis estrarano de KEA, de la Viktoria Esperanto-klubo, kaj de la Carson Eduka Fondaĵo. Myra estis longdaŭra subtenanto de la Nord-Okcidenta Esperanto-Konferenco, NOREK. Myra Larsen faris elstaran kaj gravan laboron por la Carson Eduka Fondaĵo kiel kasisto kaj kuratoro. (Vidu apartan artikolon pri tiu fondaĵo). Tiu fondaĵo distribuis pli ol 80,000.00 dolarojn por subvencii la instruon de Esperanto pere de vojaĝantaj instruistoj en Afriko kaj Sud-Ameriko. Ŝiaj kolegoj kuratoroj estis Anne Neave, Allan Simon, Jean Smythe kaj Wally du Temple.

Wally du Temple finis sian panegiron pri Myra Larsen per laŭdo de ŝia laboro por Esperanto. Li referencis al certifikato de La Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo fondita de D-ro Stanley J. Drake, pasinta Prezidanto de la Universitato de Fort Lauderdale. Tiu dokumento laŭdis Myra Larsen pro ŝia laboro kiel kasisto de la Eduka Fondaĵo 'Carson' kaj pro ŝia laboro por paco kaj internacia interkompreniĝo.

Kara Myra, ni bedaŭras ke vi ne povas esti kun ni hodiaŭ.' — Wally du Temple

Brian Kaneen.

Brian D. Kaneen (1935-2012)

La kanada Esperanto-movado perdis unu el siaj kolonoj la 8an de januaro, 2012, kiam Brian Douglas Kaneen mortis en Vankuvero pro kojlokancero. Motoro de la loka movado dum jardekoj, Brian ankaŭ ludis signifajn rolojn ja landa kaj internacia niveloj. Lia klereco, bonkoreco kaj ironia humursento restis tre viglaj ĝis la lastaj tagoj.

Brian naskiĝis sur Manksinsulo (Britio) la 12an de majo, 1935, en manksa familio kiu tamen ne plu parolis la tradician (keltan) lingvon. Li malkovris Esperanton kiel 15-jarulo kaj unuafoje parolis ĝin 5 jarojn poste dum brita militservado en Germanio. En tiu epoko li ankaŭ malkovris pli vastan talenton pri lingvoj; la germana fariĝis lia ĉefa studobjekto kaj poste lia profesio, kaj dum la vivo li sukcesis iugrade mastri almenaŭ dekon da lingvoj. Pro la kontakto kun Esperanto li ankaŭ kleriĝis pri lingvopolitiko, kaj tra la jaroj ofte esprimis frustriĝon, ke la Esperanto-movado ne pli energie aktivis sur tiu kampo. Li poste fariĝis entuziasma subtenanto de la Manifesto de Prago.

Post enmigrado al Kanado en 1956, por studi ĉe la Universitato McGill en Montrealo, li faris dokorigajn studojn ĉe Universitato Cornell en Ithaca (Nov-Jorkio, Usono), kie li aktivis en la loka Esperanto-klubo. En 1965 Brian ekloĝis en Vankuvero, kaj ekde tiu tempo li ludis gvidan rolon en Vankuvera Esperanto-Societo kiel sekretario kaj poste kiel prezidanto. Kiel docento ĉe Universitato Simon Fraser en Burnaby, li organizis kaj gvidis multajn Esperanto-kursojn, precipe en la jaroj antaŭ la 69a Universala Kongreso de Esperanto (1984), en kies Loka Kongresa Komitato li servis kiel sekretario kaj vic-prezidanto. Li estis ankaŭ multjara delegito de UEA en Vankuvero, kaj fakdelegito pri lingvoj - rolo kiu ofte kondukis al gastigado de eksterlandaj vizitantoj.

Kiam Interreto komencis disvastiĝi en la naŭdekaj jaroj, Brian rapide komprenis gigan signifon, kaj li iniciatis kaj gvidis la plej fruajn retlistojn por kanadaj esperantistoj. Li ankaŭ akceptis novajn respondecojn en la landa asocio, kiel redaktoro de Lumo, vicprezidanto (1999) kaj prezidanto (2000-03). Ĝis la fino, li ne ĉesis admoni kaj sproni siajn samlandanojn al pli aktiva informado kaj organiza agado. Li elektiĝis Honora Membro de KEA en 1997.

Ĉiam tre modesta en sia vivstilo kaj sinprezento, Brian postlasis konsiderindan monsumon, kiun li malavare disdonis al diversaj familianoj, amikoj, kaj organizoj. Inter la ĉefaj heredantoj estas la usona fondaĵo ESF (Esperantic Studies Foundation), kiu en la lastaj dek jaroj energie antaŭenpuŝis la agadon por pli efika Esperanto-instruado kaj pli justa lingvopolitiko. Similan monsumon Brian dediĉis al

— la starigo de fondaĵo por subteni la lernadon de la manksa au irlanda lingvoj sur lia hejminsulo. — Mark Fettes

DISTRAĴOJ

Kukolo en la Nesto

Ĉiu suba listo enhavas unu vorton kiu ne apartenas kun la aliaj – forstreku ĝin:

1. Kuliso, histriono, marioneto, tetrao, sufloro.
2. Tragedio, vodevilo, skeĉo, monologo, komedono.
3. Liturgio, servico, misalo, komunio, litanio.
4. Mulo, gulo, pulo, hulo, kulo.
5. Robajo, togo, burnuso, pareo, kimono.
6. Jado, gagato, granato, opalo, turkiso.
7. Volteo, komutilo, katodo, amplifikatoro, dinamo.
8. Sproto, kitio, skombro, gasterosteo, engraŭlo.
9. Rubeolo, pirokorako, kokluŝo, korizo, frambezio.
10. Karoserio, kluĉilo, manbremso, skusorbilo, aŭtoklavo.
11. Iterbio, fermio, micelio, lantano, gadolinio.
12. Igvanodonto, anakoluto, diplodoko, pterodaktilo, mastodonto.
13. Tafto, mohajro, kalikoto, silikato, trikoto.
14. Silvestro, Volfgango, Perpetua, Huberto, Ĝerminalo.
15. Imunigo, antibiotiko, vakcinio, serumo, desinfektaĵo.
16. Kuracao, akvaforto, absinto, ĉerizbrando, arako.
17. Paralelepipedo, elipsoido, toro, konuso, kvaranteno.
18. Ruĵo, henao, ŝminko, lipazo, pudro.
19. Vibrio, lispado, balbutado, afazio, kartavado.
20. Solresol, Volapuko, Novial, Loglan, Gondvano.

— Dankon al Marjorie Boulton